



Sten Johansson

VOJAÔ KUN

KATRINA

Facila rakonto



Vojaĝo kun Katrina

Dua rakonto pri Katrina

Facila rakonto kun klarigoj de la malfacilaj vortoj
kun aldonoj en la angla kaj korea lingvoj

Originale verkis Sten JOHANSSON

Glosis en la angla lingvo la aŭtoro

kaj Edmund GRIMLEY EVANS

Glosis en la korea lingvo L E E J u n g k e e

Unua eldono: Al-fab-et-o, Skövde, Svedio, 2001

Tria eldono: Seula Esperanto-Kulturcentro

Ĉiuj rajtoj estas rezervitaj ĉe la aŭtoro kaj la eldonisto

Distribuas: Seula Esperanto-Kulturcentro

#601 Myungdong Doms, 305, Samil-daero, Jung-gu,

Seulo, 04537, Koreio (010-3340-5936)

Retpoŝto: leejungkee@khu.ac.kr

Presita en Seulo, Koreio

Sten Johansson

VOJAĜO KUN KATRINA

Facila rakonto

Tria eldono

Seula Esperanto-Kulturcentro

Enhavo:	Paĝo
1. Aŭtuno ĉe la maro	3
2. En sveda lernejo	5
3. Pensi pri amo	7
4. Brua klaso	9
5. Du amikinoj	11
6. Militoj nova kaj malnova	14
7. Arbo de paco	17
8. Ekskurso al la maro.....	20
9. Ĉe printempa fajro	24
10. Silento en la klaso.....	26
11. Sendi kaj atendi bildkarton	28
12. Freneza decido	30
13. En blua tendo	32
14. Al Varsovio	36
15. Vizito en la urbo	38
16. Proksime al Belorusio.....	41
17. Por ne perdi unu la alian	44
18. En pola arbaro	46
19. Bjalistoka knabo	49
20. Hejme plej ĉarme.....	51
Teknika postklarigo por instruantoj	53

1. Aŭtuno ĉe la maro

Estas aŭtuno ĉe la maro. Juna virino iras sur vojeto. Ŝi rigardas al la maro. Estas nuba vetero, kaj ŝi estas sola. Ŝi haltas, rigardas al la maro, pensas kaj iras plu sur la vojeto. La aŭtuna maro estas griza.

La nomo de la virino estas Katrina. La maro plaĉas al Katrina. Ŝi rigardas al ĝi kaj pensas pri somero, pri vojaĝoj, pri foraj landoj. Katrina volas vojaĝi. En somero ŝi ofte vojaĝas. Sed nun estas aŭtuno, la suno ne brilas, la nuboj kaj la maro estas grizaj. Estas aŭtuno, kaj Katrina nun ne povas vojaĝi. Aŭtune ŝi devas labori.

Ŝi iras plu, haltas kaj pensas. Ŝi estas sola. Ne plaĉas al ŝi esti sola. Ŝi volas vojaĝi kun amiko. Sed nun tio ne eblas.

Sur la maro iras ŝipo. Ĝi estas granda ŝipo kun multaj homoj. Ili vojaĝas al alia lando. Ne al fora lando, sed al alia. La ŝipo iras al Danio. Katrina volas somere vojaĝi per ŝipo al Danio. Danio plaĉas al ŝi. De Danio ŝi povas vojaĝi plu al Germanio. Ankaŭ Germanio plaĉas al ŝi. Sed nun ŝi devas labori en Svedio. Nun ŝi ne povas ŝipvojaĝi.

En Germanio estas amikoj de Katrina. Ŝi nun pensas pri ili. Eble ili pensas pri ŝi – eble ne. Ŝi ne scias. Ili estas someraj amikoj. En somero ŝi povas vojaĝi al ili. En aŭtuno ne. Somere ŝi estas kun bonaj amikoj, sed aŭtune ŝi estas sola. Katrina rigardas al la griza maro kaj pensas pri la amikoj.

Nun ŝi parolas al la maro. “Mi volas vojaĝi”, ŝi diras al ĝi. “Mi volas iri al foraj landoj.” Sed la maro ne respondas. Ĝi silentas. Ne, ĝi ne silentas, sed ĝi ne parolas al ŝi.

Katrina ne plu rigardas al la maro. Ŝi iras for de ĝi. Ŝi ne plu volas pensi pri somero kaj vojaĝoj. Nun ŝi volas pensi pri aŭtuno kaj laboro. Plaĉas al ŝi pensi pri la laboro. Ĝi estas bona laboro, kaj ĝi plaĉas al ŝi. Sed somero kaj vojaĝoj pli plaĉas al ŝi.

Glosoj: esperante / *angle* / koree

(Literoj ^{A-F} montras oftecon de la radiko; ^A = plej ofta, ^F = plej malofta.)

aŭtun-e ^B en aŭtuno / *in the autumn* / 가을에

aŭtuno ^B sezono post somero / *autumn, fall* / 가을

Danio..... lando inter Svedio kaj Germanio / *Denmark* /
덴마크

dano ^E ano de nordeŭropa nacio inter Svedio kaj Germanio /
Dane / 덴마크인

for-a ^B malproksima / distant / 먼

Germanio..... lando inter Pollando kaj Nederlando / *Germany* / 독일

germano ^Ĉ ano de granda eŭropa nacio inter Pollando kaj Neder-
lando / *German* / 독일인

griza ^Ĉ koloro inter nigra kaj blanka / *grey* / 회색의

somer-e ^C en somero / *in summer* / 여름에

Svedio lando inter Norvegio kaj Finnlando / *Sweden* /
스웨덴

svedo ^Ĉ ano de nordeŭropa nacio inter Norvegio kaj Finnlando /
Swede / 스웨덴인

ŝip-vojaĝi ^{BB} vojaĝi per ŝipo / *travel by ship* / 배로 여행하다

2. En sveda lernejo

Estas aŭtuno en sveda lernejo. Katrina laboras, kaj la laboro plaĉas al ŝi. Ŝi estas instruisto. Ŝi instruas en granda lernejo. Estas multaj infanoj en la lernejo. La infanoj lernas, kaj Katrina instruas. Ŝi ŝatas instrui. Kelkaj infanoj ŝatas lerni, aliaj ne. Katrina estas juna. Ŝi estas nova instruisto. La lernejo estas la unua laborejo de Katrina. Ŝi ŝatas labori en la lernejo. Nun estas aŭtuno, kaj Katrina ŝatas labori.

En la klaso de Katrina estas dudek kvin infanoj. Dek kvin estas knaboj kaj dek knabinoj. La infanoj vivas en la sveda urbo Gotenburgo. Ankaŭ Katrina vivas en Gotenburgo, kaj ŝi laboras en gotenburga lernejo. La familioj de la infanoj venas el multaj landoj. Nun ili vivas en Svedio, sed ilia origino estas en la tuta mondo. Kelkaj el ili vivas en Gotenburgo de longa tempo, aliaj de mallonga. Kelkaj estas originaj gotenburganoj.

Katrina estas svedino. Ŝi nun vivas en Gotenburgo, sed origine ŝi venas el malgranda sveda urbo.

Post la laboro Katrina ofte estas laca. De la lernejo ŝi reiras al la loĝejo. Tie ŝi manĝas kaj ripozas. Poste ŝi devas pensi pri morgaŭ. Ŝi devas bone plani. Instrui estas bona kaj grava laboro. La infanoj plaĉas al ŝi. Katrina ŝatas esti instruisto, sed ŝi estas laca instruisto. La labor-tagoj estas longaj, sed la tagoj por ripozi estas mallongaj. Kaj la aŭtunaj tagoj en Gotenburgo ofte estas grizaj.

Glosoj:

Gotenburgo^F dua urbo de Svedio (*Göteborg*) / *Gothenburg* /
고텐부르크

laca ^C sen-forta, ripozema / *tired* / 피곤한

origino ^D unua devenloko / *origin* / 기원, 출신

ripozi ^C ne labori, ne fari ion, por mallaciĝi / *rest* / 휴식하다

3. Pensi pri amo

Dum kelkaj jaroj Katrina studis. Ŝi studis por esti instruisto. Nun ŝi ne plu studas, sed eklaboris post la studoj. Ŝi estas instruisto. Ŝi instruas infanojn en granda lernejo. Ŝi havas klason el dudek kvin lernantoj.

Aŭtune, vintre kaj printempe Katrina studis. Sed somere ŝi ne studis. En la someroj ŝi unue laboris, kaj poste vojaĝis. Ŝi ŝatis vojaĝi al aliaj landoj. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi renkontis junan viron en Germanio. Lia nomo estas Bruno. Ŝi ekamis lin. Ŝi jam amis aliajn virojn antaŭ li, sed Bruno estis neforgesebla. Ŝi ne multe renkontis lin. Nur kelkfoje. Tamen ŝi ne povas forgesi lin. Sed la lasta renkonto ne estis bona. Jes, bona – sed ankaŭ malbona. Okazis aferoj bonaj kaj malbonaj.*) Nun ŝi ne volas pensi pri tio. Li ne plu amas ŝin. Li havas alian amikinson. Ĉu Katrina plu amas lin? Eble – eble ne. Ŝi nun ne havas tempon pensi pri tio. Ŝi devas multe labori. Por nova instruisto ne estas tempo por pensi pri amo.

Tamen ŝi pensas pri amo. Ŝi ne havas tempon, kaj ŝi ne volas pensi pri ĝi, sed ŝi devas pensi pri ĝi. Pri Bruno. La pensoj de Katrina mem iras al li. Kaj poste la pensoj iras al ŝi. Al Franciska, la alia amikino de Bruno. Katrina faris al Franciska ion malbonan. Tion ŝi ne povas forgesi. Ŝi volas forgesi, sed tio ne eblas. Nun ŝi tamen devas pensi pri io alia. Pri la laboro. Ŝi devas prepari lecionon de la sveda lingvo por morgaŭ. Ŝi devas elpensi taskojn al la lernantoj. Ŝi planas lecionon pri la akuzativo. Ŝi devas prepari ekzemplojn. “Mi amas lin. Li amas ŝin.” Stulte! De kie venis tiu stulta ekzemplo?

Katrina pensas pri somero, pri vojaĝoj, pri amo. Ŝi ne havas tempon pensi, sed ŝi ne povas ne pensi. Ŝi ne havas tempon ami, sed ne eblas ne ami.

*) Vidu: *La krimo de Katrina*, la unua rakonto pri Katrina.

Glosoj:

akuzativo ^E	n-formo / <i>accusative</i> / 목적격
ekzemplo ^B	io, kion oni imitu; unu el similaj / <i>example</i> / 예, 예문
el-pensi ^A	trovi aŭ krei per la pensoj / <i>invent, think up</i> / 고안하다, 생각해내다
forgesi ^B	malmemori / <i>forget</i> / 잊다
leciono ^Ĉ	parto (pli-malpli horo) de instruado / <i>lesson</i> / 수업
lern-anto ^B	iu, kiu lernas / <i>pupil</i> / 학생
ne-forges-ebla ^B	tia, ke ne eblas forgesi lin / <i>unforgettable</i> / 잊을 수 없는
prepari ^C	fari tion, kio estas necesa por povi komenci fari ion / <i>prepare</i> / 준비하다
printempo ^C	sezono antaŭ somero / <i>spring</i> / 봄
stulta ^C	nebone pensanta, malinteligenta / <i>stupid</i> / 바보스런, 우둔한
tasko ^C	io, kion oni devas fari / <i>task</i> / 과제
vintro ^Ĉ	mal-somero / <i>winter</i> / 겨울

4. Brua klaso

“Katrina, venu!”

“Katrina, mi petas!”

“Katrina, helpu min!”

“Ne, stultulo! Ŝi devas veni unue al mi! Mi petis ŝin antaŭ vi!”

“Mi ne komprenas ĉi tion!”

“Katrina, ĉu mi faris bone? Rigardu, mi petas!”

“Ĉu oni diras *ol mi* aŭ *ol min*? Mi ne scias!”

La lernantoj de Katrina laboras pri taskoj. Ili devas labori silente. Por ricevi helpon, ili devas levi manon. Tamen ili ne silentas, kaj ili ne levas manon. Jes, kelkaj estas silentaj. Tri-kvar knabinoj. Sed la aliaj tuj krias por helpo. Katrina petas ilin silenti, sed tio ne multe helpas.

La klaso nun havas lecionon de la sveda lingvo. Por dek klasanoj ĝi estas la familia lingvo, ilia unua lingvo. Por dek kvin ĝi estas la dua lingvo. Aŭ la tria. Kelkaj bezonas multe da helpo pri ĝi.

“Ĉu *studi* kaj *lerni* estas samaj?” demandas Zejnab.

Katrina devas pensi.

“Jes, preskaŭ”, ŝi respondas.

La familio de Zejnab venis el Irano. Aliaj venis el Grekio, Finnlando, Ĉilio kaj multaj aliaj landoj. La klaso de Katrina estas internacia klaso en sveda lernejo. La infanoj en la klaso havas dek du jarojn. Ili preskaŭ ne plu estas infanoj, sed junuloj.

Halina vivas en Svedio de malpli ol unu jaro. Por ŝi la sveda lingvo estas malfacila. Sed ŝia amikino Gloria tre ŝatas helpi ŝin. Gloria estas svedino, sed ŝia patro donis al ŝi brunan haŭton. Li venis el Afriko.

Saŝko kaj Andreas ĉiam malpacas. Saŝko diras *ol mi* kaj Andreas *ol min*. Aŭ male. Ĉiam malsame. Neniam same. La aliaj klasanoj ofte ridas pri ilia malpaco.

La klaso de Katrina estas brua. Kelkaj lernantoj laboras bone sen helpo. Sed multaj el ili bezonas oftan helpon. Dum la lecionoj, Katrina ne havas tempon pensi pri io alia. Kelkfoje iu knabo tre bruas, kaj ŝi devas sendi lin for el la klasĉambro. Sed plej ofte ĉiuj kune laboras, parolas, malpacas, ridas kaj krias en la klasĉambro. Dum la lecionoj estas ĉiama bruo. Post leciono Katrina estas tre laca. Eble ankaŭ ŝiaj lernantoj estas lacaj.

Glosoj:

- Afriko ^Ĉ..... kontinento sude de Eŭropo / *Africa* / 아프리카
bruna ^C..... koloro de malnova ligno / *brown* / 갈색의
ĉiam-a ^B..... tia, ke ĝi restas ĉiam, ne ĉesas / *constant, perpetual* /
 늘, 항상 의
Ĉilio ^E..... lando en okcidenta Suda Ameriko / *Chile* / 칠레
Finnlando..... lando inter Svedio kaj Rusio / *Finland* / 핀란드
finno ^E..... ano de nordeŭropa nacio inter Svedio kaj Rusio / *Finn* /
 핀란드인
Grekio lando en sudorienta Eŭropo, ĉefurbo *Ateno* / *Greece* /
 그리스
greko ^E..... ano de nacio en sudorienta Eŭropo / *Greek* /
 그리스인
haŭto ^C..... la ekstero de homa aŭ besta korpo / *skin* / 피부
inter-nacia ^C..... kio rilatas al malsamaj nacioj aŭ landoj / *international* /
 국제적인
Irano ^E..... lando en okcidenta Azio inter Irako kaj Afganio / *Iran* /
 이란
mal-paco ^C..... batalado inter malamikoj / *war* / 불화

5. Du amikinoj

En la klaso de Katrina du knabinoj estas tre bonaj amikinoj. Ili estas Halina kaj Gloria. Unu estas svedino, la alia ne. Unu estas blonda, la alia havas nigrajn harojn kaj brunan haŭton. Unu estas alta, la alia malalta. Unu ofte ridas, la alia plej ofte estas serioza.

Halina kaj Gloria ne delonge konas unu la alian. Gloria vivas en Gotenburgo de ĉiam kun sia sveda patrino kaj afrika patro. Antaŭ malpli ol jaro Halina venis de Pollando kun sia patrino. Tamen ŝi ne estas polino. Nek ŝia patrino. Al Pollando ili venis el alia lando. Ilia origina lando estas Belorusio.

Antaŭe Gloria neniam aŭdis la nomon de tiu lando. Tamen ĝi ne estas tre fora lando. Ĝi estas inter Pollando kaj Rusio. De Belorusio al Svedio estas malpli ol kvincent kilometroj. Tio ne estas longa vojo. Sed en Svedio oni ne bone konas la landon de Halina.

Halina estas malalta, blonda kaj ofte rigardas serioze tra la okulvitroj. Gloria estas alta kaj ofte ridas. Tiam ŝi skuas la kapon, kaj ĉiuj ŝiaj etaj harplektaĵoj saltas gaje. Ankaŭ kiam ŝi koleras, ili saltas. Sed ŝi koleras malofte, kaj kutime ne tre longe.

Printempe Gloria havis koramikon. Lia nomo estas Manuelo, kaj li tiam estis en la sesa klaso. Ŝi estis en la kvina. Sed poste ŝi ekkonis Halinan, kaj aŭtune ili komencis en la sesa klaso. Nun Manuelo ne plu plaĉas al ŝi. Ŝi preferas esti kun Halina. Kompreneble, ili ŝatas rigardi kaj renkonti knabojn. Sed ili ĉiam estas duope. Duope ĉio estas pli amuza. Duope ili nenion timas. Duope eblas ŝerci pri la knaboj. Kiam la amikinoj estas kune, ili ĉiam povas ridi pri io.

Gloria ŝatas sporton, sed Halina preferas legi. Ŝi rapide lernis legi en la sveda lingvo. Halina facile lernas. Tamen ŝi ofte demandas Gloria'n "kion signifas tio" aŭ "mi ne komprenas ĉi tion". Dufoje en ĉiu semajno Gloria ekzercas sin pri longa saltado. Tiam Halina sidas sur benko kun libro. Kiam Gloria saltas, ŝia amikino rigardas ŝin. Poste ŝi denove legas.

Unufoje en ĉiu semajno Halina iras al biblioteko por prunti librojn. Gloria iras kun ŝi kaj rigardas la librojn, sed ŝi ne pruntas.

"Mi ne havas tempon legi", ŝi diras. Kelkfoje Halina diras al ŝi "tiun libron vi *devas* legi", kaj donas al ŝi libron. Sed kiam estas tempo redoni la libron al la biblioteko, ŝi plej ofte legis nur etan parton.

Tamen la amikinoj ŝatas esti kune. Ili neniam malpacas. Kiam ili estas kune, preskaŭ ĉiam ĉio estas amuza.

Glosoj:

Belorusio	lando inter Rusio kaj Pollando / <i>Belarus</i> / 벨라루스
beloruso ^E	ano de nacio inter Rusio kaj Pollando / <i>Belarusian</i> / 벨라루스 인
benko ^D	meblo por sidi (por pluraj homoj) / <i>bench</i> / 벤치
biblioteko ^Ĉ	librejo, libraro, kie oni povas legi aŭ prunti librojn / <i>library</i> / 도서관
blonda ^Ĉ	kun helaj haroj / <i>blond</i> / 금발의
ekzerci ^D	lertigi (sin aŭ alian) per praktika ripetado / <i>exercise</i> / 연습하다, 훈련하다
har-plekt-aĵo ^{BE} ...	longa plektaĵo el haroj sur la kapo / <i>plait</i> / 땃은 머리
kilometro ^Ĉ	1 000 metroj / <i>kilometre</i> / 킬로미터
koleri ^C	esti kolera, agi kolere / <i>be angry</i> / 화내다
kor-amiko ^{BA}	amiko, kiun oni amas / <i>boy/girlfriend</i> / 애인

okul-vitroj ^{BC}	du vitroj en framo por vidi pli bone / <i>glasses</i> / 안경
-ope ^Ĉ	en grupo(j) de, kune, (du-ope = du -oj kune) / <i>at a time, together</i> / 단체로, 무리로 (du-ope 2 인조로)
plekti ^E	interkruce kunigi sen nodoj / <i>plait</i> / 엮다, 땀다
Pollando	lando inter Germanio kaj Belorusio / <i>Poland</i> / 폴란드
polo ^E	ano de nacio inter Germanio kaj Belorusio / <i>Pole</i> / 폴란드인
prunti ^Ĉ	preni por poste redoni, doni por poste repreni / <i>borrow, lend</i> / 빌리다, 빌려주다
Rusio	la plej granda eŭropa lando / <i>Russia</i> / 러시아
ruso ^E	ano de la plej granda eŭropa nacio / <i>Russian</i> / 러시아인
semajno ^B	7 tagoj / <i>week</i> / 주
serioza ^C	sen rido aŭ ŝerco / <i>serious</i> / 심각한
skui ^Ĉ	subite, forte movi ion tien-reen / <i>shake</i> / 흔들다
sporto ^Ĉ	korpaj ekzercoj kaj ludoj, por plezuro aŭ konkurso / <i>sport</i> / 스포츠
ŝerci ^Ĉ	diri ion ridigan / <i>joke</i> / 농담하다

6. Militoj nova kaj malnova

Saŝko kaj Andreas batalas. Ili ĉiam malpacas, sed kutime ne okazas vera batalo. Antaŭ du-tri jaroj, kiam ili estis malgrandaj, ili ofte batalis. Nun ne plu. Nun ili estas dekdu-jaraj. Ili ne plu estas knabetoj. Antaŭe, kiam ili batalis, la samklasanoj kutime nur rigardis ilin. Oni rigardis la batalon, sed ne helpis la knabojn. Sed nun la infanoj estas pli grandaj. Preskaŭ junuloj. Nun oni malhelpas la batalon. Semir kaj Robert tenas Saŝkon. Daniel kaj Ali malhelpas al Andreas batali. Dum kelka tempo la du knaboj krias unu al la alia. Poste ili disiras kaj revenas en la klasĉambron. Jam delonge estas tempo de leciono. Katrina atendas ilin. Ŝi komencas la lecionon. Estas leciono de historio. La klaso studas malnovan militon inter Svedio kaj Rusio.

Katrina montras mapon pri la milito. La svedaj militistoj iris tra Pollando al oriento. Halina rigardas la mapon kaj flustras al Gloria:

“Vidu! Jen *Minsk* sur la mapo! Ĉu vi vidas?”

Gloria lace rigardas la mapon kaj respondas:

“Jes. Kio do?”

Halina sekigas la okulojn per la mano kaj diras:

“Ĝi estas mia urbo. Tie mi vivis kun Patro kaj Patrino.”

Gloria rigardas ŝin. Halina ofte estas serioza, sed nun ŝi estas pli ol serioza. Ŝi malĝojas.

Nun Katrina ekvidas sangon en la vizaĝo de Saŝko. Kaj ĉe alia tablo en la klasĉambro sidas Andreas kun malpura vesto. Eble estas sango sur ĝi. Katrina komprenas. Okazis milito. Pli nova milito, ol tiu sur la mapo. Ŝi petas Saŝkon iri al necesejo por purigi la vizaĝon.

Poste ŝi demandas:

“Kio do okazis? Ĉu vi interbatalis?”

Tuj la du knaboj ekparolas samtempe. Post mallonga tempo ili krias unu al la alia, kaj Katrina devas silentigi ilin.

“Ĉu iu alia vidis, kio okazis?” ŝi demandas.

Unue neniun respondas, sed poste Semir diras:

“Ili batalis, kiel kutime.”

“Pri kio?” demandas Katrina.

“Pri futbalo”, diras Semir.

“Pri Grekio”, krias Andreas.

“Pri Makedonio”, kriegas Saŝko.

“Kio do?” demandas Katrina. “Ĉu tiuj du landoj futbalis?”

“Ne, ne!” krias Saŝko. “Grekio ne scias futbali.”

“Ha! Vi scias nenion! Grekio venkas ĉiujn!” rekrias Andreas.

Multaj klasanoj ekridas. Ili jam ofte aŭdis la malpacan kriadon de la du knaboj. Daniel ridegas kaj diras:

“Svedio povas venki kaj Grekion kaj Makedonion!”

Sed Katrina enspiras kaj diras:

“Silentu! Silentu! Ĉi tio estas lernejo, ne futbalejo! Ni ne povas labori, kiam ĉiuj krias samtempe. Ĉu vi estas knabetoj de infanejo? Silentu kaj aŭskultu!”

Ŝi denove montras la mapon. Sur ĝi oni vidas la vojon de la svedaj militistoj antaŭ tricent jaroj. La vojo iras tien kaj reen, orienten, norden kaj suden. Fine ĝi malaperas fore en sud-oriento. Ankaŭ la pensoj de Katrina iras tien kaj reen. Ĉu ankaŭ ŝiaj pensoj malaperas en nenion? Ne, tamen ne. Ŝi diras:

“Tiu mapo montras militon antaŭ jarcentoj. Jen ekiris la svedaj militistoj, kvardek mil viroj. Poste ili batalis, militis. Post multaj jaroj, jardekoj, tre malmultaj el ili revenis en Svedion. Tio

“Ne, ni volas fari novajn stultaĵojn!” diras Semir, kaj liaj samklasanoj ridas.

dis-iri ^A.....iri en malsamajn direktojn / *part, separate, go away* /
 흩어지다

flustri^D..... mallaŭte paroli (por ke ne ĉiuj aŭdu) / *whisper* /
속삭이다

jar-deko ^B10 jaroj / *decade* / 10 년

mapo Ĉ..... desegno de (parto de) lando, urbo aŭ de la mondo /
map / 지도

sek-igi ^Cforigi akvon / *dry* / 건조시키다

16

7. Arbo de paco

Dum du tagoj la klaso de Katrina faras bildon. Ili faras bildon de arbo. Sur muro de la klasĉambro ili pentras grandan arbon. Ĉiuj infanoj helpas pentri ĝin. La arbo estas dika kaj havas multajn foliojn. Ĉiu infano faras unu folion, do ĉiuj folioj estas malsamaj. Sur la folioj ili skribas la vorton *paco*. Ĉiu infano skribas la vorton *paco* en sia lingvo. Daniel skribas *fred*. Semir skribas *mir*. Julieta skribas *paz*. Xixian skribas 和平. Andreas skribas ειρήνη kaj Saŝko мир. Zejnab skribas جالال. Ĉiu skribas en sia lingvo. Sur dudek kvin folioj estas dudek kvin vortoj. Dek folioj havas la saman vorton, la svedan *fred*.

“Katrina”, diras Gloria, “ĉu mi rajtas fari du foliojn?”

“Kial do, Gloria?”

“Ĉar mi havas du lingvojn. Mi parolas svede kun Panjo kaj mia frato, kaj angle kun Paĉjo.”

“Jes, bone, do faru du foliojn.”

Do Gloria aldonas duan folion kun la vorto *peace*.

Nun Halina ekpensas pri io. Ankaŭ ŝi faras du foliojn.

“Kial vi faris du, Halina?” demandas Maja.

“Ankaŭ mi havas du lingvojn. Tiu estas rusa, de mia patro, kaj tiu belorusa, de mia patrino.” Ŝi montras du foliojn kun la surskriboj мир kaj пакой.

Katrina demandas, ĉu ankoraŭ iu alia parolas du lingvojn hejme.

“Mi kutime parolas svede kun mia fratino”, diras Julieta.

“Do, se vi volas, aldonu folion”, diras Katrina.

Fine la arbo estas preskaŭ preta. Tiam Katrina pentras folion.

“Ĉi tie mi volas aldoni lingvon, kiu estas la lingvo de ĉiuj”, ŝi diras. Sur la folio ŝi skribas *paco*. Finfine la arbo pretiĝis.

Poste ŝi rakontas pri la lingvo Esperanto, kiun ŝi parolas.

“Ĉu vi parolas ĝin hejme kun via edzo?” demandas Daniel.

Katrina ridetas.

“Ne. Mi ne povas. Mi ne edziniĝis. Sed mi parolas ĝin kun amikoj en aliaj landoj.”

Ĉe la arbo de paco Katrina metas du seĝojn.

“Jen vidu”, ŝi diras. “Ĉi tie estas la loko de repaciĝo. Kiam iuj en la klaso malpacas aŭ malamikiĝas, ili devas iri ĉi tien. Ili devas sidiĝi ĉe la arbo de paco por paroli pri la afero. Kaj ĉi tie devas esti paco. Ĉiuj devas interparoli amike, ne kii kaj kompreneble ne batali.”

“Do Saŝko kaj Andreas devas ĉiam sidi tie!” diras Semir.

Kelkaj el la infanoj scivolas pri la lingvo Esperanto, kiun Katrina aldonis al la arbo. Ŝi instruas al ili kelkajn vortojn el tiu lingvo. Ili lernas *saluton* kaj *ĝis revido*. Poste *dankon* kaj *ne dankinde*. Kaj fine ŝi instruas *bonvolu veni al la arbo de paco*, sed tio estas tro malfacila.

Tamen ili ne havas tempon lerni pli da esperantaj vortoj. Ili devas ekzerci sin pri svedaj vortoj. Kaj poste la leciono finiĝas.

“Dankon pro via bela pentrado de la arbo!” diras Katrina.

“Ne dankinde”, diras Halina kaj iras el la klasĉambro.

Glosoj:

angla ^Ĉ..... la lingvo de Usono kaj aliaj landoj; el ĉefa parto de Britio
/ *English* / 영어의

angl-e ^Ĉ..... en la angla lingvo / *in English* / 영어로

edzo ^A..... leĝa kunvivanto / *husband* / 남편

folio ^Ĉ..... plata, verda parto de planto / *leaf* / 잎

paĉjo ^D	karesa vorto por patro / <i>daddy</i> / 아빠 (아버지의 애칭)
panjo ^D	karesa vorto por patrino / <i>mummy</i> / 엄마 (어머니의 애칭)
pentri ^Ĉ	kolorigi, fari (desegni) bildon per farboj / <i>paint</i> / 그림 그리다
preta ^B	fin-farita / <i>ready</i> / 준비된
rajti ^B	havi permeson / <i>be permitted to</i> / 권리를 갖다

Xixian [ŝiŝian]nomo de ĉina knabino

“paco” en diversaj lingvoj

<i>fred</i> [fred]	en la sveda lingvo
<i>mir</i> [mir]	en la bosna (kaj aliaj) lingvoj
<i>paz</i> [pas]	en la hispana lingvo
<i>peace</i> [pi:s]	en la angla lingvo
ειρήνη [irini]	en la greka lingvo
мир [mir]	en la makedona, rusa (kaj aliaj) lingvoj
пакoй [pakoј]	en la belorusa lingvo
和平 [heping]	en la ĉina lingvo
سولھ [solh]	en la persa lingvo

8. Ekskurso al la maro

Pasis la vintro. Komenciĝas la printempo. La lernantoj de Katrina kreskas. Kelkaj el ili jam iĝis dektri-jaraj. De temp' al tempo ŝi diras al ili "silentu do, infanoj!" Tiam ofte iu respondas "mi ne estas infano!"

La lernejo de Katrina estas en nord-orienta parto de la urbo. La infanoj de ŝia klaso loĝas en domoj en tiu urboparto. En iu tago, Katrina faras ekskurson kun ili. Per tramo la klaso ekskursas okcidenten, al la maro.

Ili iras al la maro en tago, kiam la suno brilas. Tamen ne estas varme. Estas la komenco de printempo kun malvarma vento el okcidento, el la maro. La maro ankoraŭ ne varmiĝis. Ankaŭ la tero ne.

Katrina rigardas la knabojn kaj knabinojn. Kelkaj knaboj rapidas tien-reen, esploras ĉion, senĉese moviĝas. Sed kelkaj knabinoj nur staras senmove. Ili interparolas, sed ne moviĝas. Ili ne havas tre dikajn vestojn. Katrina pensas, ke ili malvarmas. Du knabinoj staras malantaŭ kelkaj arboj. Ŝi vidas, ke ili fumas. Ili ne rajtas fumi. Estas lerneja tago. Lernejo ĉe-mara. Sed ŝi ne volas diri tion al ili. Se ŝi dirus tion, ili nur irus pli foren kaj fumus plu.

Sur benko proksime al la maro sidas Gloria kaj Halina. Katrina ekvidas, ke Halina ploris. Ŝi iras al ili.

"Kio okazis, Halina? Ĉu vi malvarmas?" ŝi demandas.

Halina kapneas.

"Kial vi malĝojas? Ĉu vi ne ŝatas la maron?"

Halina nenion respondas, sed Gloria diras:

"Ŝi ekpensis pri sia patro."

Katrina pensas. Ŝi scias, ke Halina vivas kun sia patrino. Ŝi sidiĝas ĉe la knabinoj.

“Kio okazis al via patro, Halina?”

Halina rigardas Katrina’n kaj respondas:

“Li estas... li malaperis.”

“Ĉu malaperis? Kiel do?” demandas Katrina.

“Ni ne scias. Li nur malaperis. Eble li estas en malliberejo. Aŭ eble... eble li ne plu vivas.”

Ŝi rigardas suben al la tero.

“Sed... ĉu la polico ne povis helpi?”

Halina nur kapneas kaj rigardas foren al la maro. Gloria diras:

“La patrino de Halina pensas, ke la polico kaptis lin.”

“Ĉu vere?” Katrina ne bone komprenas. “Kial do? Kion li faris?”

Nun Halina levas la kapon kaj rigardas ŝin. Ŝi diras:

“Patro estas ĵurnalisto. Ankaŭ Patrino. Sed Patro skribis multe..., kio ne plaĉis al la politikistoj. Pri aliaj homoj, kiuj malaperis. Pri malbonaĵoj, kiujn faris politikistoj kaj polico. Do ili kaptis lin.”

“Terure!” Katrina ne scias, kion plu diri. Estas malfacile kompreni. Fine ŝi demandas:

“Ĉu pro tio vi foriris de via lando?”

“Nu... ne tuj. Patrino volis ekscii, kio okazis al Patro. Esplori. Ne per la polico, sed per amikoj. Aliaj ĵurnalistoj. Sed ŝi perdis sian laboron. Kaj oni skribis aĉajn aferojn sur nia pordo.”

“Kiajn aferojn?”

“Nu... oni skribis ‘judoj’ kaj faris aĉajn desegnojn. Kaj alion. Mi ne povas diri.”

“Judoj? Ĉu vi estas judoj?” demandas Katrina.

“Patro estas judo, sed Patrino ne. Poste oni ĵetis ŝtonon tra nia fenestro. Tiam kelkaj amikoj helpis nin iri al Pollando.”

“Terure! Kaj poste vi venis ĉi tien, ĉu ne?”

“Jes. Sed eble ni ne rajtas resti. Oni ankoraŭ ne decidis pri tio. Ni povas nur atendi kaj esperi.”

“Katrina”, nun diras Gloria. “Ĉu vi pensas, ke ni povus skribi al iu, kiu decidus pri tio? Estus aĉe, se Halina ne rajtus resti en Svedio!”

Katrina pensas dum kelka tempo kaj rigardas la grizan maron. Poste ŝi diras:

“Nu, kompreneble ni povus skribi leteron. Sed mi pensas, ke tio eble ne multe helpus. Tamen, tio povus esti bona ideo. Ni povus fari tion morgaŭ en la leciono de la sveda lingvo.”

Glosoj:

de temp’ al tempo = kelkfoje / *now and then* / 수시로

desegni ^Ĉ fari bildon per krajono (sur papero) / *draw* / 묘사하다,
윤곽을 그리다

ekskurso ^Ĉ mallonga vojaĝo pro plezuro / *excursion* / 관광

esplori ^C rigardi, por malkovri ion nekonatan / *investigate* /
조사하다, 탐색하다

fumi ^C elblovi fumon; ensuĉi kaj elblovi fumon de brulanta
tabako / *smoke* / 담배를 피우다

judo ^D ano de nacio vivanta en multaj landoj, sed plej multe
en Israelo / *Jew* / 유대인

ĵurnalo ^Ĉ ĉiutaga gazeto / *newspaper* / 신문

kap-nei ^B diri “ne” per movo de la kapo / *shake one’s head* /
머리를 흔들어 부정하다

mal-liber-ejo ^B domo, kie la ŝtato tenas homojn en mallibero / *prison*
/ 감옥소

mal-varmi^Besti malvarma, senti malvarmon / *be cold* / 춥다,
추위를 느끼다

politiko^Ĉregado de ŝtato / *politics* / 정치

sen-ĉese^Cĉiam, sen halto / *incessantly* / 중단없이

tramo^Eurba veturilo sur reloj / *tram, streetcar* / 전차

9. Ĉe printempa fajro

Pasas semajno post semajno. Ĉiutage Katrina estas lacega post la laboro. En ĉiu semajnfino ŝi ŝatus fari ion, amuziĝi, vojaĝi, viziti dancejon, renkonti amikojn. Sed kutime ŝi nur ripozas. Ripozas por havi forton por la sekva semajno.

La klaso skribis kaj sendis leteron kun peto, ke Halina kaj ŝia patrino rajtu resti en Svedio. Ĉiuj klasanoj volas, ke oni ne resendu ŝin. Kaj kien resendi ŝin? Ĉu al Belorusio, aŭ nur al Pollando? Katrina ne scias. Ŝi tamen pensas, ke nur al Pollando.

Nun estas vera printempo, kaj la tagoj pli kaj pli varmiĝas. Finiĝas aprilo. En la lasta vespero de aprilo Katrina iras por rigardi grandan fajron. La svedoj kutimas festi la printempon per fajro. Oni ankaŭ kantas kaj faras paroladon al la printempo. Ankaŭ Katrina ŝatas la printempon. Sed ŝi preferus, ke tuj estu somero. Se nun estus somero, ŝi estus libera kaj povus vojaĝi. Tamen ankoraŭ estas printempo. Ankoraŭ ŝi devas labori dum pli ol monato antaŭ la somera libertempo.

Katrina rigardas la homojn, kiuj festas la printempon. Ĉi tie estas familioj, geedzoj junaj kaj maljunaj, junuloj kaj infanoj. Kiam ŝi vidas ĉiujn homojn, ŝi sentas sin sola. Kial ŝi venis ĉi tien sola? Ŝi devus renkonti iun amikon. Sed ŝi estas tre laca. Ŝi atendas la someron. Ŝi atendas la ripozon.

Tiam ŝi ekvidas iun, kiun ŝi konas. Ĉe la fajro staras Gloria. Ŝi parolas kun knabo pli juna. Malantaŭ ili staras virino kaj viro.

“Saluton, Gloria!” krias Katrina.

Kiam la knabino ekvidas Katrina’n, ŝi rapidas al ŝi.

“Saluton Katrina! Ĉu ankaŭ vi ŝatas la fajron?”

“Jes, mi ŝatas ĝin. Ĉu vi venis kun viaj gepatroj?”

“Jes, kaj mia frato Charlie.” Ŝi diras al siaj gepatroj: “Panjo! Paĉjo! Jen Katrina, mia instruistino!”

La du geedzoj venas saluti Katrina’n. Ŝi manpremas, unu manon helan kaj maldikan, unu malhelan kaj dikan. Poste ŝi interparolas kun ili. La patro de Gloria diras, ke Gloria tre ŝatas sian instruistinon. Tio estas bona. Sed li pensas, ke devus esti pli da ordo en la klaso. La instruisto devas decidi, ne la infanoj. Kiam la instruisto parolas, la infanoj silentu.

Katrina ridetas kaj nenion diras. Ankaŭ ŝi ŝatus, ke estu pli da ordo kaj silento en la klaso. Sed kiel fari tiun ordon kaj silenton? Kiel ordigi kaj silentigi la klason? Ŝi ne scias.

Glosoj:

aprilo ^Ĉ la 4a monato de la jaro / *April* / 4 월

ge-edzoj ^A edzo kaj edzino / *husband and wife* / 부부

ge-patroj ^B patro kaj patrino / *parents* / 부모

hela ^C pli blanka ol nigra / *bright, light* / 밝은

ordo ^B bona aranĝo, neĝenata situacio / *order* / 질서, 순서

Charlie [ĉarli] nomo de knabo

10. Silento en la klaso

“Kie hodiaŭ estas Halina?” demandas Katrina matene en la klaso. “Gloria, ĉu vi scias? Ĉu ŝi malsaniĝis?”

“Mi ne scias. Ŝi nenion diris al mi”, respondas Gloria.

“Ĉu vi povus telefoni al ŝi por demandi?”

“Jes, eble post ĉi tiu leciono, antaŭ la leciono de la sveda.”

Sed antaŭ ol Gloria havas tempon telefoni, Katrina ricevas informon de la lernejestro. Li diras, ke Halina ne plu povas veni al la lecionoj en ĉi tiu klaso. Ŝi ne plu bezonas lecionojn de la sveda lingvo. Oni decidis, ke ŝi kaj ŝia patrino ne rajtas resti en Svedio. Oni sendis ilin al Pollando.

Kiam Katrina pludonas tiun informon al siaj lernantoj, iĝas silente en la klaso. En ŝia klaso ne ofte estas silente, sed nun oni aŭdas neniun sonon. Poste tamen aŭdiĝas sono. Sono de plorado. La ploranto estas Gloria, sed certe ankaŭ kelkaj aliaj klasanoj preskaŭ ploras.

“Ĉu ili jam forvojaĝis?” demandas Julieta.

Neniu scias. Tion la informo ne diras. Ili decidas tuj sendi Gloria’n kaj Julieta’n por esplori, ĉu Halina kaj ŝia patrino restas hejme. Poste Katrina rekomencas la lecionon.

Estas leciono de matematiko, kaj la infanoj devas mem labori pri siaj taskoj. Tamen restas pli silente ol kutime, kaj nur malofte iu petas helpon de Katrina.

Post malpli ol horo la du knabinoj revenas. En la loĝejo de Halina neniue estis hejme. Nun Gloria ne plu ploras. Ŝi koleras.

“Kial ni sendis tiun stultan leteron?” ŝi krias. “Certe neniue legis ĝin! Ili fajfas pri ni! Ili pensas, ke ni estas nur infanoj! Ni ne gravas! Junuloj neniam gravas! Kaj ili fajfas pri Halina! Mi timas,

ke tiuj policistoj povus kapti ankaŭ ŝian patrinon. Ankaŭ ŝi estas ĵurnalisti! Ni estis stultaj, kiam ni skribis tiun leteron. Ni pensis, ke ili zorgas. Ni pensis, ke ili legas leterojn. Estis stulte! Neniu zorgas! Estus pli bone, se ni...”

Sed poste ŝi ne scias, kion diri. Ŝi ne scias, kio estus pli bona, ol skribi leteron. Gloria koleregas, sed ŝi ne scias kion fari el sia kolero.

Katrina rigardas la amikinojn de Halina kaj sentas grandan malĝojon. Kial oni forsendis la seriozan belorusan knabinon? Kaj kial oni agis tiel rapide? La klaso povus fari festenon por diri al ŝi *ĝis revido*. Oni povus doni al ŝi donacon kaj brakumi ŝin. Sed nun tio ne eblas. Ŝi estas for.

Halina estas for. Jen ĉio. Jen la fino.

Glosoj:

brak-umi ^B ĉirkaŭbraki, teni la brakojn ĉirkaŭ iu / *hug, embrace* /

포옹하다

donaci ^Ĉ doni senpage, por plezuro aŭ ĝojo / *give, donate* /

선물하다

estro ^C superulo, tiu, kiu decidas / *head, boss* / 장, 수장

fajfi ^D fari akrajn sonojn per pintaj lipoj aŭ per ilo / *whistle* /

휘파람을 불다

fajfi pri = ne atenti, ne zorgi pri / *not give a damn about* /

~에 대하여 무관심하다

festeno ^D festa manĝo / *feast* / (식사를 겸한) 연회

matematiko ^E lernado pri nombroj kaj figuroj, kalkulado /

mathematics / 수학

zorgi ^B pensi pri tio, kion oni devas fari / *care about* /

돌보다, 염려하다

11. Sendi kaj atendi bildkarton

Sekvas kelkaj malĝojaj tagoj en la klaso de Katrina. Katrina malĝojas. Gloria koleras. Julieta malĝojas. Ankaŭ kelkaj aliaj parolas pri Halina. Sed aliaj klasanoj ŝajne rapide forgesas ŝin. Gloria estis ŝia sola vera amikino. Kaj kion fari? Oni jam forsendis ŝin, do ne plu eblas fari ion.

Post du semajnoj Gloria iutage venas al la lernejo kun pli gaja mieno. Ŝi montras al Katrina bildkarton. Ĝi venis el Varsovio en Pollando. Sendis ĝin Halina.

Katrina legas la vortojn sur la bildkarto. Halina skribis, ke ili estas en Varsovio kaj esperas resti tie. Ankoraŭ ŝi ne iras al lernejo kaj ŝia patrino ne laboras. Fine ŝi skribis ilian adreson en Varsovio.

“Mi skribos al ŝi”, tuj diras Gloria. “Eble somere mi povos viziti ŝin. Katrina, ĉu vi pensas, ke tio eblos?”

Katrina ridetas.

“Nu, tio eblos nur se viaj gepatroj iros kun vi. Vi ne povas iri sola al Pollando!”

“Eble la tuta klaso povus iri! Kun vi, Katrina!” proponas Gloria. Nun Katrina devas ridi.

“Estus amuze”, ŝi diras. “Sed mi pensas, ke tio ne eblos. Ne iras tramo de ĉi tie al Pollando, kiel al la maro!”

Katrina denove povas ŝerci. Post la bildkarto de Halina ŝi iom pli ĝojas. Kaj pro la propono de Gloria, ŝi ekpensas pri la somero. Kien ŝi vojaĝu ĉi-somere? Ŝi devus jam plani sian libertempon.

Do, kiam Gloria sendas bildkarton al Halina en Pollando, ankaŭ Katrina skribas bildkarton. Ŝi skribas al Bruno en Germanio. Katrina tamen ne demandas, ĉu ŝi povos viziti lin. Ŝi skribas, ke ŝi somere vojaĝos suden kaj certe trapasos Germanion. Se Bruno

ŝatus renkonti ŝin, li eble respondos kaj invitos ŝin al li. Sed ŝi ne certas, ke li vere faros tion.

Post kiam Halina malaperis, Gloria kaj Julieta amikiĝas. Tamen ili ne tiel amuziĝas, kiel antaŭe faris Halina kaj Gloria. Kaj baldaŭ estos somero. Post la somero, ili komencos la sepan klason en alia lernejo. Ili havos aliajn instruistojn. Baldaŭ ili disiĝos de Katrina kaj ŝia arbo de paco.

Post kelkaj semajnoj finiĝas la lernejo. Finiĝas la sesa klaso. Estas somero. Ĉiuj estas liberaj, ankaŭ Katrina. La infanoj tre ĝojas pro la libero, sed Katrina plej ĝojas. Nun ŝi povos ripozi kaj vojaĝi. Tamen de Bruno ankoraŭ ne venis respondo. Ŝi devos plu atendi.

En la lasta tago de la lernado Gloria diras al Katrina:

“Halina ne respondas. Ĉu vi pensas, ke io okazis al ŝi?”

Glosoj:

inviti ^Ĉpeti iun veni ien / *invite* / 초대하다

mieno ^Ĉesprimo de la vizaĝo / *look, expression* / 표정

proponi ^Cdiri al iu, ke oni faru ion / *suggest, propose* / 제안하다

Varsovio ^Eĉefurbo de Pollando (*Warszawa*) / *Warsaw* / 바르샤바

12. Freneza decido

Estas somero. Katrina ankoraŭ atendas respondon de Bruno. Sed ŝi pli kaj pli komprenas, ke respondo ne venos.

Gloria vizitas ŝin, unufoje kun Julieta, aliffoje sola. Ankaŭ Halina ne respondas. Gloria estas maltrankvila.

“Mi devas vojaĝi tien! Se io okazis al ŝi, mi... mi ne scias, kion mi faros!”

Ŝia mieno montras, ke la tuta polico de Belorusio devus timi, kion ŝi faros al ili.

“Sed Gloria, mi ne povas helpi vin”, diras Katrina. “Se viaj gepatroj volas vojaĝi al Pollando, vi faru tion. Sed alie ne eblas.”

“Ili ne volas. Sed ni povos iri. Vi kaj Julieta kaj mi.”

Katrina rigardas ŝin. Gloria estas serioza. Post kiam la serioza Halina malaperis, la gaja Gloria serioziĝis.

“Mi ŝatus vojaĝi kun vi, Gloria. Sed viaj gepatroj certe ne permesus tion.”

“Se ili permesos, ĉu vi iros kun mi?” tuj demandas Gloria.

Katrina ridetas kaj pensas. Ŝi pensas, ke tio estas freneza ideo. Tamen, ĝi estas freneza ideo, kiu plaĉas al ŝi. Sed kompreneble ĝi ne plaĉos al la gepatroj de la knabino. Tamen ŝi respondas:

“Bone. Se ili permesos, ni iros.”

Nun Gloria ŝajnas la malnova gaja Gloria, kaj ŝiaj etaj nigraj harplektaĵoj saltas freneze sur ŝia kapo.

Pasas kelkaj tagoj. Poste telefonas al Katrina la patrino de Gloria. Ŝi invitas Katrina'n al sia hejmo por paroli pri propono de Gloria.

Kiel la dektri-jara knabino faris, por ke la gepatroj permesu al ŝi vojaĝi kun Katrina? Ŝi ne scias. Sed post kelkaj interparoloj la

afero jam estas preta. Oni decidas pri la vojaĝo. Du semajnojn Gloria rajtos foresti de sia hejmo. Ĉiutage ŝi devus telefoni hejmen. Kaj ili rajtos iri nur al Pollando, ne al iu alia lando.

Katrina demandas sin, kion ŝi decidis. Ĉu ŝi estas freneza? Somere, kiam ŝi devus ripozi. Kiam ŝi devus renkonti Brunon – aŭ aliajn amikojn. Eble trovi novan koramikon. Tiam ŝi decidis vojaĝi kun knabino el sia klaso. Jen freneza decido!

Glosoj:

freneza ^Cnenormala, mense malsana, malprudenta, stulta /

mad, crazy / 미친

permesi ^Crajtigi / *allow* / 허락하다

mal-trankvili ^Besti maltrankvila, agi maltrankvile / *be worried* /

불안하다

13. En blua tendo

Malgranda blua aŭto iras suden de la urbo Gotenburgo. En ĝi sidas Katrina, juna instruistino, kaj ŝia dektri-jara lernantino Gloria. En unu tago ili venas ĝis la urbo *Ystad* kaj suriras ŝipon al Pollando. Matene la aŭto jam veturas sur pola vojo.

“Mi estas lacega”, diras Gloria. “Mi tute ne dormis en tiu ŝipo.”

“Ankaŭ mi”, diras Katrina. “Ni devos baldaŭ halti por dormi. Mi preferus halti ĉe la maro.”

Post horo ili trovas tendumejon ĉe la maro. Ili haltas, kaj Katrina komencas kunmeti sian malgrandan tendon.

“Hm. Mi delonge ne faris ĉi tion. Jen, Gloria, tenu tiun... ne, tio ŝajnas stranga... eble tiu kaj ĉi tiu kune... mi esperas, ke ni kunhavas ĉion...”

Finfine la tendo estas preta. Eta blua tendo staras ĉe la granda blua maro sub sennuba blua ĉielo. La virino kaj la knabino portas kelkajn aĵojn el la aŭto en la tendon. Baldaŭ ĉio estas silenta.

Estas bela tago. La suno brilas al la blua tendo. Estas silente kaj trankvile. Post kelkaj horoj aŭdiĝas subita krio:

“Fu! Kiel varmege! Mi ne povas spiri!”

Ĉe unu flanko malfermiĝas la tendo, kaj aperas kapo de knabino kun nigraj harplektaĵoj al ĉiuj mondojflankoj. Preskaŭ tuj aperas kapo ankaŭ ĉe la alia flanko de la tendo, tamen sen harplektaĵoj.

“Mi estas malsata”, diras la knabino.

“Ankaŭ mi. Ni manĝu ion. Sed ĉu vi ne ŝatus unue esplori la maron?”

Ili decidis unue iri en la maron, kiu estas tre malvarma. Poste ili manĝas en kafejo ĉe la tendumejo. Postmanĝe Katrina trinkas kafon kaj Gloria kolaon.

“Pollando plaĉas al mi”, diras la knabino.

“Ankaŭ al mi.”

“Kaj mi pensas, ke vi plaĉas al tiu polo”, ridas Gloria. Ŝi rigardas la vendiston en la kafejo. “Li rigardas vin senĉese! Li certe enamiĝis.”

“Ĉu al mi? Eble al vi”, respondas Katrina, kaj ili ambaŭ flustre ekridegas.

Vespere Katrina kaj Gloria kuŝas en la tendo. Ili ne povas dormi. Ili interparolas. Gloria parolas pri sia familio. Ŝi havas multajn parencojn en Afriko, kiujn ŝi ŝatus iam viziti. En Svedio ŝi ne havas multajn parencojn. Ŝia patrino ne havas gefratojn. La patro de Gloria venis el la afrika lando Gambio antaŭ dek kvin jaroj. Li estas juristo, sed en Svedio li ne trovis juran laboron. Do li komencis instrui afrikan dancon. Antaŭe li neniam dancis, sed tio ne gravis. En vendejo li trovis tamburon, kaj baldaŭ li ekinstruis dancadon. Ĉiuj svedoj pensis, ke afrikano kompreneble scias tamburi kaj danci. Neniu pensis, ke li estas senlabora juristo. Multaj svedoj volis lerni afrikan dancadon. Unu el ili estis juna virino, kiu laboris en infanejo. La juristo el Gambio instruis al ŝi danci, kaj post kelka tempo ŝi iĝis la patrino de Gloria kaj ŝia frato Charlie.

Poste Katrina rakontas pri sia patrino, kiu laboras en malsanulejo kaj ŝatus kanti. Ŝi vivas sola kaj ne havas aliajn gefilojn ol Katrina’n.

“Kaj via patro?” scivolas Gloria.

“Mi ne konas lin.”

“Ĉu li estas svedo?”

“Mi ne scias”, diras Katrina. “Eble jes, eble ne. Tio ne vere gravas.”

“Ĉu vi neniam serĉis lin?”

Katrina pripensas, kaj poste diras:

“Nu, mi multe pensis pri li. Sed mia patrino ne volas paroli pri li. Eble iam mi serĉos lin. Eble mi eĉ havas gefratojn. Duongefratojn.”

Ili silentiĝas, sed ankoraŭ ne povas dormi. En tendo oni tre klare aŭdas ĉiujn sonojn el ĉiuj flankoj. Katrina pensas, ke ili jam iĝis du amikinoj, ne plu instruistino kaj lernanto. Gloria pensas pri sia amikino Halina, kiun ŝi perdis. Sed ŝi certe baldaŭ retrovos ŝin. Eble jam morgaŭ.

Fine la du amikinoj endormiĝas.

Glosoj:

ambaŭ ^B..... ĉiuj du / *both* / 양측, 둘 다

du-on-ge-fratoj ^B...homoj kun sama patro, sed malsama patrino aŭ male /
half-brothers and half-sisters / 이복 형제

en-am-iĝi ^B.....ekami iun / *fall in love with* / 사랑에 빠지다

en-dorm-iĝi ^B.....ekdormi / *fall asleep* / 잠 들다

fu! ^E..... esprimo de laceco, malŝato, malfacila spirado aŭ alio /
whew!, phew! / 어이쿠 (피곤하거나, 배고프거나, 어려움을
때 내뿜는 소리)

Gambio ^E..... okcidentafrika lando ĉirkaŭata de Senegalo / *Gambia*
/ 잠비아

hm! ^E..... esprimo de dubo, hezito aŭ embaraso / *h'm!* /
흞 (의심, 주저 또는 당황할 때 내뿜는 소리)

juro ^D..... leĝaro / *law* / 법, 법률

kolao ^E..... bruna gas-trinkaĵo kun ekstrakto el kolanuksoj / *cola* /
콜라

mondo-flanko ^{BB} .. nordo, sudo, oriento, okcidento / *point of the compass*
/ 동서남북(방위)

parencio ^C..... familiano (ankaŭ neproksima) / *relative* / 친척

post-manĝe ^B post la manĝo / *after the meal* / 식후에

sata ^B tia, ke oni ne bezonas manĝi / *full, satiated* / 배부른

tamburo ^E cilindroforma muzika instrumento, sur kiu oni faras
sonon per battoj / *drum* / 북, 드럼

tendo ^D dometo el ŝtofo / *tent* / 텐트

tend-um-ejo loko por starigi tendon, kun necesejoj ktp. / *campsite* /
야영장

Ystad [i:stad].....haven-urbo de Svedio / 스웨덴 항구 도시

14. Al Varsovio

Matene la blua aŭto veturas plu sur polaj vojoj. Proksime al la maro ili vidas arbaron, sed kiam ili venas pli suden kaj orienten, vidiĝas nur kampoj. La du svedinoj en la aŭto ne scias, kio kreskas sur la kampoj. Ili ambaŭ estas urbaninoj kaj ne konas tiajn kamparajn aferojn.

“Ĉi tie estas multe da homoj en la kamparo”, diras Katrina. “Tio plaĉas al mi. En la sveda kamparo oni vidas nenion.”

“Sed ĉio estas sama. Nur kampoj”, diras Gloria. “Mankas arbaro kaj lagoj.”

Ili haltas en urbo kaj vizitas kafejon. Kiel kutime Katrina trinkas kafon kaj Gloria kolaon. Ĉe alia tablo sidas juna blondulo, kiu parolas per poŝtelefono. Gloria saltetas kaj ekkrias:

“Mi forgesis telefoni!” Kaj ŝi elpoŝigas sian telefoneton kaj premas kelkajn klavojn. Iu respondas, sed ŝi komprenas nenion. Ĉu ŝi malbone klavis? Tiam Katrina diras al ŝi:

“Ne forgesu klavi +46 por Svedio!”

Gloria provas denove, kaj nun respondas ŝia patro. Ŝi parolas kun li angle dum kelka tempo, poste ŝi remetas la telefonon en la poŝon kaj diras al Katrina:

“Li petis min saluti vin kaj diri, ke vi devas decidi ĉion, ne mi.”

Ili ambaŭ ridas, dum la junulo rigardas ilin scivole.

“Jen denove iu enamiĝis”, flustras Katrina.

“Jes, sed al kiu?” demandas Gloria kaj ridas.

Vespere ili venas en la urbegon Varsovio. Kiel nun trovi la hejmon de Halina? Ili demandas trifoje, sed neniu rekonas la

adreson, kiun ŝi skribis sur bildkarto. Fine virino en urba informejo donas al ili mapon de la urbo kaj montras, kie ili trovos la domon.

Estas jam la sepa horo vespere, kiam ili haltas antaŭ malbela domo. Ili eniras kaj serĉas la familian nomon de Halina – Vajzman. Nenie ĝi estas. Ili trairas la tutan domon. Nenie ili trovas tiun nomon. Kvinfoje ili demandas pri belorusa virino kun filino dekdu-jara. Nur la sesa homo, maljuna virino, memoras, ke ĉi tie loĝis tia familio dum mallonga tempo. Sed ŝi ne povas diri, kie ili nun estas.

Denove Katrina kaj Gloria vespere kuŝas en la eta blua tendo. Sed nun ili ne interparolas. Ili estas lacegaj post longa tago, kaj ili malĝojas. Kion nun fari? Kiel trovi Halina'n?

Glosoj:

kamp-aro ^B..... mal-urbo / *countryside* / 시골,

klavo ^E..... plateto aŭ butono, kiun oni premas por funkciigi
aparaton / *key* / 자판, 건반

poŝ-telefono ^{CB}telefoneto libere portebla / *mobile phone* / 휴대전화

provi ^B.....fari por vidi, ĉu io eblas aŭ estas bona / *try* / 시도하다

urb-ano ^Btiu, kiu vivas en urbo / *town-dweller* / 도시 주민

15. Vizito en la urbo

Matene estas griza vetero, kiam Katrina kaj Gloria vekigas en la eta blua tendo. Kaj same griza estas la mieno de Gloria.

“Ellitiĝu”, diras Katrina. “Ni devas matenmanĝi.”

“Mi ne volas”, respondas la knabino. “Mi ne malsatas.”

“Gloria”, diras Katrina. “Ni devas pripensi, kiel trovi Halina’n. Sed oni malbone pensas sen manĝo. Kaj mi malbonege pensas sen kafo. Do, ek al matenmanĝo!”

Post la matenmanĝo, Gloria diras:

“Eble la poloj resendis ilin en Belusion.”

“Povas esti. Ni demandu pri tio. Sed unue ni devas ekscii, kie demandi. Tamen, ankaŭ eblas, ke ili restas en Varsovio.”

“Sed ĉi tie estas milionoj da homoj.”

Katrina kapjesas, pensas iom kaj diras:

“Devas esti aliaj belorusoj ĉi tie. Eble iu konas ilin. Ni scias, ke la patrino estas ĵurnalisto, kaj ni konas iliajn nomojn. Certe iu alia scias, kie ili estas. Ni devas trovi tiun alian.”

Gloria ne respondas. Katrina plu pensas.

“Ĵurnalisto!” ŝi subite diras. “Kompreneble! Ĵurnalistoj! Nun mi scias!” Ŝi serĉas inter siaj aĵoj kaj trovas informfolion. Poste ŝi serĉas ion sur la mapo de Varsovio. “Ha, jen! Venu, Gloria! Ni faros viziton en la urbo.”

“Kie?” scivolas Gloria.

“Vi vidos. Ni iru aŭte. Dum ni aŭtos, vi povos ekzerci vin pri kelkaj Esperantaj vortoj.”

Do ili ekiras per la blua aŭto de Katrina. Kiam ili alvenas ĉe la strato *Niepodległości*, iom sude de la urbocentro, Gloria jam rememoras *saluton*, *ĝis revido*, *dankon* kaj *ne dankinde*. Plue ŝi

lernis *mi estas sveda knabino* kaj *mia nomo estas Gloria*. Tio ne estas multe, sed pli bone io ol nenio.

En la Esperanto-redakcio de Pola Radio neniue atendas ilin. Tamen, post kelka tempo redaktorino tre amike salutas ilin. Katrina klarigas, kaj baldaŭ la redaktorino pretas helpi ilin. Sed ŝi rapide komprenas, ke Gloria ne vere parolas Esperanton.

“Ha, vi estas eta krokodilo”, ridas la redaktorino.

Gloria tre surpriziĝas. Ĉu ŝi diris krokodilo? Strange! Poste la redaktorino interparolas kun Katrina. Gloria unue aŭskultas por eble aŭdi, ĉu ili parolas pri Halina. Sed baldaŭ ŝi ne plu aŭskultas.

Fine ili forlasas la Esperanto-redakcion, sed ne la domon. Ĉiuj tri iras al alia redakcio. Sur ĝia pordo estas tabulo kun surskribo, kiun Gloria ne scias legi.

“Jen la belorusa redakcio de Pola Radio”, flustras Katrina al Gloria. Ili renkontas junan viron. Sekvas longa interparolo, per traduka helpo de la Esperanta redaktorino. Poste la viro kapjesas, pretigas mikrofonon, kaj Katrina diras al Gloria:

“Li rakontos en sia programo, ke ni venis el Svedio por serĉi belorusan knabinon. Nun li volas, ke vi diru kelkajn vortojn svede al Halina. Eble ŝi aŭskultas la programon, eble ne. Ni provu.”

Gloria ne havas tempon pensi, sed tuj ekparolas en la mikrofonon:

“Saluton, Halina! Mi volas renkonti vin! Katrina kaj mi nun estas en Varsovio. Telefonu kaj diru, kie vi estas!” Poste ŝi diras la numeron de sia poŝtelefono.

La redaktoro parolas ankoraŭ iom kun Katrina. Poste ili disiĝas. La Esperanta redaktorino diras al Gloria *ĝis revido*, kaj ŝi respondas *ne dankinde*. Sed kiam la aliaj ekridas, ŝi tuj komprenas, ke ŝi diris ion amuzan. Kiam Gloria kaj Katrina iras de la Pola Radio, Gloria diras:

“Estis bonega ideo! Sed ĉu vi pensas, ke Halina aŭskultas tiun programon?”

“Ne eblas scii”, respondas Katrina. “Eble ŝi ne aŭskultas. Sed mi esperas, ke aŭskultas iu, kiu scias, kie ŝi estas.”

Glosoj:

el-lit-iĝi^B iri el la lito / *get out of bed* / 침대에서 일어나다

krokodilo^E granda kvarpieda rampulo vivanta en riveroj;
esperantisto, kiu parolas nacian lingvon inter
esperantistoj / *crocodile* / 악어 * 에스페란티스토들
모임에서 민족어를 사용하는 사람을 일컬음

mikrofono^E parolilo por registri aŭ plilaŭtigi voĉon / *microphone* /
마이크

miliono^Ĉ 1 000 000 / *million* / 백만

programo^D aro da prezentaĵoj, elsendo de radio aŭ televido /
programme / 프로그램

radio^Ĉ linioforma ero de lumo aŭ alia signalo; aparato, kiu
aŭdigas sonojn / *radio* / 전자파, 라디오

redakcio^E redaktistaro; redaktejo / *editorial department* / 편집부

redaktoro^E redaktisto / *editor* / 편집자

sur-skribo^A vortoj skribitaj sur io / *inscription, text* / 새겨진 글

surprizi^Ĉ mirigi per io neatendita / *surprise* / 놀라게 하다

Niepodległość [njepodlegŭoŝçi]

16. Proksime al Belorusio

Nokte pluegas en Varsovio. Ankaŭ sur la etan tendon de Katrina kaj Gloria falas pluvego. Kiam la pluvo falegas sur la tendon, estiĝas timiga sono. Tamen la tendo eltenas, kaj ili restas sekaj. Matene la pluvo jam ĉesis, sed ĉie la tero tre malsekiĝis. Nur en la tendo estas seke.

Jam antaŭ la matenmanĝo Katrina telefonas al la belorusa redakcio de Pola Radio. Ŝi longe interparolas angle kun iu redakciano, kaj dume skribas ion. Gloria aŭskultas, sed ŝi aŭdas nur la vortojn de Katrina, ne tiujn de la redakciano. Tamen ŝi komprenas, ke iu telefonis al Pola Radio.

“Kion oni diris? Kio okazis? Ĉu Halina telefonis?” ŝi tuj demandas, post kiam Katrina finis la telefonan interparolon. Ŝi preskaŭ saltas, dum ŝi sidas en la eta tendo.

“Trankviliĝu!” diras Katrina. “Telefonis ne Halina, sed iu viro, kiu konas ŝian patrinon. Li donis adreson.”

“Ĉu la adreson de Halina?”

“Ne, li ne donis ŝian adreson. Unue li volis renkonti nin. Eble li ne konas ŝian hejman adreson. Aŭ eble li timas, ke io ne estas en ordo. Sed li donis la adreson de sia laborejo.”

“Do ni iru tien, ĉu ne? Tuj!” krias Gloria.

“Trankviliĝu, Gloria! Ankaŭ mi volas iri tien. Sed ni devas unue paki kaj enaŭtigi ĉion. La adreso ne estas en Varsovio, sed en alia urbo proksime al Belorusio. Do, ni kunportu ĉion! Sed unue ni matenmanĝu. Vi scias, ĉu ne: Sen manĝo oni malbone pakas.”

“Mi scias, mi scias”, diras Gloria. “Kaj sen kafo vi malbonege pakas!”

Post la nokta pluvego, la suno reaperas. Ĉiuj arboj ŝajnas puraj, la tero ekfloras kaj komencas sekiĝi. Pasas kelkaj horoj, kaj jen eta blua aŭto kun virino kaj knabino enveturas en la urbon Bjalistoko en nordorienta Pollando. La duopo haltas urbocentre por tagmanĝi kaj demandi, kie trovi la straton *Reymonta*. Kaj post plua horo ili eniras en etan vendejon de floroj, kaj renkontas sinjoron Popoŭski.

Katrina rakontas al la sinjoro pri ilia vojaĝo, kaj Gloria rakontas pri sia amikino Halina. Fine sinjoro Popoŭski diras al Gloria:

“Bone, via amikino vivas ĉi tie en Bjalistoko kun sia patrino. Sinjorino Vajzman, la patrino, laboras ĉe eta gazeto belorusa, kiu aperas ĉi tie. Legas ĝin belorusoj en Pollando, kaj ankaŭ en Belorusio. Mi tuj telefonos al tiu gazeto.”

Li vere faras tiel, kaj post la telefona interparolo ĉiuj tri trinkas teon en la florvendejo. Post kelka tempo kaj pli da teo, virino venas en la vendejon. Gloria eksaltas sur sia seĝo. Jen la patrino de Halina!

Dum kelkaj minutoj ĉiuj interparolas. Pli vere, ŝajnas, ke ĉiuj parolas, sed neniuj aŭskultas. Poste tri virinoj – ne, du virinoj kaj unu knabino – enaŭtiĝas kaj veturas tra la urbo. Fine ili alvenas ĉe mezgranda domo kaj tie parkas la aŭton. Ili eniras en la domon, kaj fine sinjorino Vajzman malfermas pordon kaj krias en la loĝejon:

“Halina! Venu vidi!”

La vortojn *venu vidi* ŝi diras en la sveda lingvo. Unue estas silente, sed jen ili aŭdas Halina’n paroli, tamen ne en la sveda, sed en alia lingvo, kiun ne komprenas Gloria kaj Katrina. Fine aperas la amikino de Gloria. Ŝi haltas antaŭ ili kaj nur rigardas ilin. Ŝiaj okuloj tre grandiĝas. Poste Halina ĝojege ridetas, iras antaŭen ĝis sia amikino kaj forte brakumas ŝin. Kiam finiĝas la brakumo, ŝiaj

okuloj estas plenaj de larmoj. Tamen ŝi ne ploras. Estas larmoj de
ĝojo!

Glosoj:

Bjalistoko ^E.....urbo en nordorienta Pollando, kie naskiĝis L.L.

Zamenhof (Białystok) /

비알리스톡, 자멘호프의 탄생지

el-teni ^A.....kontraŭstari, rezisti, toleri, ne disiĝi / *endure*, 참아내다,
견디다, 인내하다

en-aŭt-igi ^B.....meti ion en aŭton / *put something in the car* /
차안에 두다

en-aŭt-iĝi ^B.....iri en aŭton / *get into the car* / 차안으로 들어가다

larmo ^Ĉ.....akvoguto el okulo / *tear* / 눈물

paki ^C.....ĉirkaŭvolvi aĵojn por transporto, meti aĵojn en valizon /
pack / 짐을 꾸리다, 포장하다

parki ^Ĉ.....provizore restigi (aŭton) / *park* / 주차하다

Reymonta [rejmonta]

17. Por ne perdi unu la alian

“Ni vivas en Bjalistoko de monato”, rakontas Halina. “Patrino eklaboris ĉe belorusa gazeto. Aŭtune mi iros al pola lernejo ĉi tie. Ĝi estas bona urbo, sed mi pli ŝatis Gotenburgon. Mi ankoraŭ ne havas amikinin ĉi tie. Kaj ĉi tie ne eblas iri trame ĝis la maro.”

Ambaŭ knabinoj memoras la printempan ekskurson antaŭ kelkaj monatoj. Tiam estis malvarma vento el la maro. Nun ili sidas sub granda arbo, tamen estas varmege. La floroj en la Bjalistoka parko, kie ili sidas, ŝajnas sekaj kaj lacaj.

“Kaj ni eksciis ion pri Patro”, pluas Halina. “Li vivas!”

Ŝiaj okuloj brilas je tiuj vortoj. Gloria rigardas ŝin kaj demandas:

“Ĉu li estas kun vi ĉi tie?”

“Ne, ne.” La okulbrilo jam malfortiĝas. “Sed ni renkontis viron, kiu vidis lin en malliberejo antaŭ kelkaj monatoj. En Minsk, nia hejmurbo. Do... ĉiuokaze tiam... li vivis.”

Nun ŝiaj okuloj ŝajnas tute malĝojaj. La brilo rapide pasis. Gloria rapidas diri:

“Li certe baldaŭ liberiĝos, ĉu ne?”

“Nu, mi esperas, ke jes. Sed tio dependas... de politiko...”

Gloria ne scias kion diri. Por ŝi politiko estas sekaj paroladoj en televido. Ne patro kaj ĵurnalisto, kiu malaperas en malliberejon.

Vespere la patrino de Halina faras etan festenon por siaj svedaj vizitantoj. Ili bone manĝas kaj trinkas. La du junulinoj promesas neniam plu perdi unu la alian.

“Bedaŭrinde mi nun ne povas viziti Svedion”, diras Halina. “Eble poste, se mi iam havos polan pasporton.”

“Sed mi povos vojaĝi ĉi tien”, diras Gloria.

“Dume”, diras Katrina, “por ke vi ne perdu unu la alian, via sveda klaso donacas al vi ĉi tion...”

Ŝi transdonas donacon al Halina, kiu tuj malfermas la paketon.

“Ho!” ŝi ekkrias. “Kia bela donaco! Poŝtelefono! Dankegon, Katrina!”

“Kaj mi telefonos al vi ĉiusemajne” diras Gloria. “Ha! Mi hodiaŭ forgesis! Mi devas telefoni al Panjo kaj Paĉjo!”

Glosoj:

parko ^Ĉ terpeco kun herbejoj, arbustoj, arboj, floroj por plezuro
/ *park* / 공원

pasporto ^E libreto, kiu ebligas viziti alian landon / *passport* /
여권

de-pendi ^C sekvi de io, ne povi fari sen io / *depend* /
~에 의존하다

plu-i ^A fari plu, daŭrigi / *go on, continue* / (시간적으로)
계속하다

tele-vido ^D bildoj je granda distanco per elektromagnetaj ondoj /
television / 텔레비전

18. En pola arbaro

Kvin homoj staras meze de pola arbaro. Ili estas Halina kaj ŝia patrino, Katrina, Gloria kaj juna viro, kiu laboras kiel arbara informisto. Li informas pri la bestoj de la arbaro. Li parolas pole, kaj Halina tradukas en la svedan. Sed ŝi ne scias la nomojn de ĉiuj bestoj, kaj tiam la viro klarigas per bildoj. Li montras informfolion, por ke ili komprenu, kiuj bestoj vivas en ĉi tiu arbaro.

La virinoj kaj knabinoj ekskursis sudorienten per la aŭto de Katrina. Kiam ili alvenis ĉi tien, Gloria ekkriis: “Ho, jen finfine vera arbaro! Antaŭe mi pensis, ke estas nur kampoj en Pollando. Nun mankas nur lagoj!”

“Estas lagoj, sed ne ĉi tie”, tiam diris sinjorino Vajzman. “Nordokcidente de Bjalistoko estas multaj lagoj.”

Poste ili renkontis la junan viron, kiu nun iras kun ili tra la arbaro. Katrina trovas lin tre ĉarma. Ŝajnas, ke ankaŭ ŝi plaĉas al li. La du knabinoj rigardas Katrinan kaj la junan viron, flustras inter si kaj faras mienojn.

Ili nun estas tre proksime al Belorusio. La patrino de Halina rakontas, ke la arbaro tie, trans la landlimo, estas multe pli granda.

“Jes”, diras la viro. “Bedaŭrinde nek homoj nek bestoj povas pasi libere tra la limo. Tio dependas de politiko. La homoj faras limojn, ne la bestoj, sed la limoj malhelpas ankaŭ la bestojn.”

Halina kaj ŝia patrino nenion diras. Ili ne rakontas, ke ili bone konas tiujn malhelpojn.

Nun la viro parolas pri iu el la bestoj, kiuj vivas arbare. Li parolas al Katrina:

“Tre multaj ĉi tie estas la cervoj. Mi trovas ĝin la plej bela besto el ĉiuj en nia arbaro.”

Bedaŭrinde, Katrina ne komprenas la polan lingvon. Kiam Halina tradukas liajn vortojn sveden, ŝi diras:

“Mi trovas vin la plej bela besto el ĉiuj...”

Katrina surpriziĝas kaj rigardas unue Halinan, poste la informiston, kaj refoje Halinan. Tiam la du knabinoj ekridegas. Ankaŭ Katrina kaj la patrino de Halina ridetas. Nur la pola informisto havas tre demandan mienon.

“Ĉu cervoj ne plaĉas al vi?” li demandas.

“Jes, mi amas ilin”, diras Katrina, kaj Halina tradukas:

“Jes, mi amas vin!”

Nun ŝia patrino devas kunhelpi por klarigi, ke la du knabinoj ŝercas pri Katrina kaj la informisto. Finfine ĉiuj ridas, sed la juna viro iomete ruĝiĝas. Eble li demandas sin, ĉu tio estis nur ŝerco.

Halina diras:

“Kiam mi plenkreskos, mi estos tradukisto. Mi tre ŝatas lingvojn.”

“Mi pensas, ke vi estos ŝercisto”, respondas Katrina. “Tradukisto devas esti tre serioza. Kiam vi estis mia lernantino, vi kutime estis serioza. Eble Gloria malseriozigis vin?”

Ili alvenas ĉe kampo kun kelkaj arboj. Sub la arboj staras kvin belegaj bestoj.

“Jen kelkaj cervoj”, flustras la arbara informisto. “Ĉu vi ne trovas ilin belaj?”

Ĉiuj kvar vizitantinoj kapjesas kaj rigardas la cervojn. Maldekstre staras granda vircervo, kaj dekstre cervino kun tri cervidoj. Kiam la homoj alproksimiĝas, la bestoj levas la kapojn kaj rigardas ilin. Poste ili silente malaperas en la arbaron.

Katrina restas senmova.

“Vere belegaj!” ŝi diras. “Tiu vircervo tre plaĉas al mi.” Ŝi ridetas al la juna viro. Li tre ĝojas, ke ŝi trovas la cervojn belaj. Eble ankaŭ li iomete plaĉas al ŝi?

Glosoj:

al-proksim-iĝi ^A veni pli proksimen / *approach* / 접근하다

cervo ^E sovaĝa besto, kies virbesto portas grandajn kornojn
(*Cervus*) / *deer* / 사슴

ĉarma ^D simpatia, plaĉa, bela, alloga / *charming* / 매력적인

inform-isto ^B homo, kiu sciigas / *informer, instructor, guide* /
홍보원, 안내원

limo ^C linio, kie finiĝas io, ekz. lando / *limit, boundary* /
경계, 국경

plen-kreski ^{AB} iĝi plenkreskulo, ne plu esti infano / *grow up* /
성인이 되다

sved-en ^Ĉ al la sveda lingvo / *into Swedish* / 스웨덴어로

traduk-isto ^C homo, kiu ali-lingvigas / *translator* / 번역가

19. Bjalistoka knabo

“Jen bildo pri la domo ĉe la strato *Zielona*, kie vivis la familio Zamenhof ĉi tie en Bjalistoko. Bedaŭrinde la domo ne plu restas.”

Sinjinorino en la Bjalistoka Esperanto-centro montras al bildo pri simpla domo kaj rakontas plu pri la knabo *Lejzer*, kiu naskiĝis tie en 1859.

“Ĉi tie li vivis de la naskiĝo ĝis sia dekkvara jaro. Tiam la familio Zamenhof transloĝiĝis en Varsovion”, pluas la sinjinorino. Poste ŝi rakontas pri la nacioj kaj lingvoj de la tiama Bjalistoko kaj pri la ideo de la juna knabo, ke la homoj malpacas, ĉar ili ne havas komunan lingvon.

Aŭskultas la polan sinjinorinon sveda instruistino, belorusa filino de ruslingva judo, kaj sveda knabino, filino de gambiano. La sinjinorino parolas en Esperanto, la lingvo de tiu Bjalistoka knabo, kaj la instruistino tradukas ĉion sveden al la du junulinoj. Do, eĉ post preskaŭ cent kvindek jaroj ŝajne mankas al la homoj komuna lingvo.

Post la vizito en la Esperanto-centro la tri amikinoj iras plu tra la urbo.

“Kia stranga afero!” diras Halina al Katrina. “Mi bone memoras, kiam vi parolis pri Esperanto ĉe nia *muro de paco*, kaj ankaŭ instruis al ni kelkajn vortojn. Sed mi tute ne sciis, ke tiu lingvo venis el ĉi tiu urbo. Kaj nun mi mem loĝas ĉi tie. Vere strange!”

“Eble via patro scias tion”, diras Gloria. “La sinjinorino diris, ke Zamenhof estis ruslingva judo, ĉu ne? Same kiel via patro! Eble vi estas parencoj!”

Ĉiuj tri ridas je tiu penso, kaj Gloria ŝerce nomas sian amikinin *Halina Zamenhof*. Sed Halina kun serioza mieno diras:

“Nu, mi pensas, ke ne, ĉar la gepatroj de mia patro vivas en Rusio. Tamen... kiam mi renkontos lin, mi demandos pri tio...”

Denove ŝiaj okuloj malsekiĝas. Gloria ekpensas, ke eble estus pli bone ne paroli tro multe pri patroj. Ĉiuokaze ne pri tiuj, kiuj malaperis.

En iu strato, eta knabo eble sep-jara staras senmove kaj nur rigardas al Gloria. Ŝiaj nigraj harplektaĵoj saltas, kiam ŝi skuas la kapon. Ŝajnas, ke li volas diri ion, tamen nenio aŭdiĝas.

“Jen ankoraŭ iu, kiu enamiĝis al vi!” diras Katrina.

“Aŭ eble al Halina”, respondas Gloria. “Sed tiu Bjalistoka knabo tute ne havas lingvon!”

Ili ridas kaj pluiras, dum la knabeto restas.

“Bone, jam estas tempo reveni al via patrino”, diras Katrina al Halina. “Kaj morgaŭ Gloria kaj mi devos komenci nian revojaĝon hejmen.”

“Ĉu tio jam necesas?” demandas Gloria. “Plaĉus al mi resti ankoraŭ iom.”

“Ankaŭ al mi”, diras Katrina. “Sed mi promesis al viaj gepatroj, ke ni revenos hejmen post du semajnoj. Ĝis hodiaŭ pasis dek unu tagoj, kaj ni havos longan vojon al Gotenburgo.”

Glosoj:

komuna ^C de kelkaj homoj kune / *common, shared* / 공통의

trans-loĝ-iĝi ^B ŝanĝi loĝejon / *move house* / 거주지를 옮기다

20. Hejme plej ĉarme

Post tagmanĝo en la sekva tago la eta blua aŭto de Katrina forveturas okcidenten el Bjalistoko. En la revojaĝo ne necesas iri tra Varsovio. Tamen la vojo estas tre longa, kaj la mieno de Gloria estas tre malgaja. En la unua horo ŝi diras eĉ ne unu vorton al Katrina, sed pli longe ŝi ne povas silenti.

“Katrina”, ŝi diras. “Ĉu vere mia klaso donacis al Halina tiun poŝtelefonon?”

“Hm”, respondas Katrina. “Vi scias, Gloria, plej ofte oni devas diri la veron. Sed iufoje tio tamen ne necesas. Kaj mi pensas, ke la plej multaj klasanoj ŝatus fari tiun donacon al ŝi, se ni demandus ilin. Ĉu ne?”

Vespere ili starigas la tendon en tendumejo proksime al mezgranda urbo. Sur granda tabulo ili legas la vortojn *Bonvenon en Toruń – urbo de Koperniko!*

“Kiu estas Koperniko?” demandas Gloria.

Katrina pripensas dum kelka tempo, kaj diras:

“Tion vi lernos en la sepa klaso. De alia instruisto.”

Gloria ridas.

“Kial vi ne diras la veron? Vi ne scias, kiu li estas, ĉu ne?”

Katrina levas la manojn.

“Kiel mi diris, kelkfoje ne necesas diri la veron.”

“Ne gravas”, diras ŝia juna amikino. “Vi tamen estas la plej bona instruisto el ĉiuj. Kaj... kaj bonega amikino!”

“Dankon, Gloria! Sed plej bonaj el ĉiuj amikinoj estas vi kaj Halina, mi pensas.”

Matene ili pluiras okcidenten por alveni vespere al la ŝipo. La suno brilas el blua ĉielo. Estas varmega tago. Denove la aŭto iras inter senfinaj kampoj.

“Nun mi komencas pensi pri Svedio”, tiam diras Gloria. “Kaj eĉ iomete pri Panjo kaj Paĉjo. Mi ŝatus jam esti hejme.”

“Ankaŭ al mi plaĉos reveni”, respondas Katrina. “Ĉie estas varme, sed hejme plej ĉarme.”

Gloria ridas.

“Nu, vere estas varme ĉi tie en Pollando. Tamen, kiam mi vojaĝos por renkonti miajn parencojn en Gambio, certe estos eĉ pli varme. Ĉu vi kuniros ankaŭ en tiu vojaĝo, Katrina?”

Katrina ridetas kaj diras:

“Eble jes, eble ne. Plaĉas al mi vojaĝi kun vi, Gloria. Ni vidos. Sed tiufoje ni ne iros per mia aŭto, ĉu?”

Glosoj:

Koperniko ^E..... astronomo en la 16a jarcento / *Copernicus* /

코페르니쿠스 (천문학자)

Torun [torunj]

Teknika postklarigo por instruantoj

La rakonto *Vojaĝo kun Katrina* celas prezenti facilan legaĵon al personoj kiuj lernis la bazan Esperantan gramatikon kaj la plej bazan vortaron. Ĝi ne estas lernolibro, sed rakonto kun la intenco distri. La lingvaĵo en dudek tre mallongaj ĉapitroj prezentas progresan defion al la leganto – alivorte: la unuaj ĉapitroj estas plej facilaj, la lastaj malplej. Ĉiuj ĉapitroj tamen uzas ĉefe simplajn, oftajn vortojn, facilajn gramatikajn formojn kaj frazojn kun simpla strukturo. La lingvaĵo konsistas el la praktike uzata, parolata, hodiaŭ vivanta Esperanto.

Pli frue aperis la rakonto *La krimo de Katrina*, kun simila enhavo kaj identa ĉefrolulino. Tamen *Vojaĝo kun Katrina* ne estas daŭrigo de tiu, sed sendependa verko.

Troviĝas kelkaj konataj klasigoj de baza Esperanta vortaro. Unu estas la Baza Radikaro de la Akademio, kun proksimume 2 500 morfemoj en naŭ grupoj. Dua estas la radikaro uzata por tekstoj *facilaj* kaj *tre facilaj* en la revuo Kontakto, kiu enhavas proksimume 1 000 morfemojn en du grupoj. Tria estas “665 plej oftaj morfemoj de parolata Esperanto”, ordigitaj laŭ ofteco, de Internacia Kultura Servo en Zagrebo.

Por uzo en ĉi tiu verko mi kombinis tiujn tri klasigojn kun du aliaj fontoj: la radikoj uzataj en kelkaj jam aperintaj “facillegaĵoj”, kaj la plej ofte aperantaj radikoj en aro da literaturaĵoj normalaj, ne facil-legaj. Surbaze de la ofteco de apero en tiuj kvin fontoj mi kreis klasigon en kvin grupoj A ĝis D.

A, la plej oftaj morfemoj, enhavas 197 morfemojn, B 258, C 269, Ĉ 350 kaj D 466; entute 1 540 morfemoj. Aldoniĝas grupo E = ĉiuj ceteraj radikoj en PIV, kaj F = ĉiuj ceteraj radikoj.

Sube mi montras la nombron de morfemoj el la grupoj A-F en ĉi tiu libro.

Grupo	A	B	C	Ĉ	D	E	F	Entute	Vortoj
Nombro	189	153	76	32	14	28	1	493	8 373

Post ĉiu ĉapitro mi glosis ĉiujn (nove) uzitajn vortojn el grupoj Ĉ-E, kaj ofte ankaŭ kelkajn aliajn.

La libreto do enhavas 493 diversajn morfemojn, el kiuj 418 estas inter la 724 plej oftaj morfemoj de Esperanto. La pli frue aperinta *La krimo de Katrina* havas 552 diversajn morfemojn en malpli ampleksa teksto. El la morfemoj de *Vojaĝo kun Katrina*, 73 % aperas ankaŭ en *La krimo de Katrina*.

Gramatike la unuaj ĉapitroj konsistas nur el mallongaj ĉef-propozicioj. En ĉapitroj 1-2 aperas nur as-formoj de la verboj, ekde ĉapitro 3 ankaŭ is-formoj kaj ekde ĉapitro 11 os-formoj. U-formojn de la verboj oni trovas ekde ĉapitro 4 kaj us-formojn ekde ĉapitro 8. Ekde ĉapitro 5 aperas malmultaj simplaj sub-propozicioj, kaj ekde ĉapitro 7 pli multaj. Ekde ĉapitro 5 aperas la refleksivo *si, sin* kaj *sia*. Akuzativo por rekta objekto troviĝas ekde ĉapitro 3, por direkto ekde ĉapitro 6. Ekde ĉapitro 6 oni trovas verbojn kun *-ig-*, kaj ekde ĉapitro 7 kun *-iĝ-*. Participoj ne aperas, krom en la substantiva formo *-anto*.

La vortordo kaj frazkonstruo estas simpla, sed mi ne evitis ne-kompletajn frazojn, tipajn de buŝa lingvaĵo. La celo estas, ke la leganto renkontu facilan vivantan lingvon.

Sten Johansson

Verkoj de la aŭtoro

Originalaj:

Denaska kongresano (novelaro, 1992)

Ĝis revido, krokodilido! (novelaro, 1996)

Interkona mateno (teatraĵoj, 1996)

Mistero ĉe Nigra Lago (romaneto por infanoj, 1997)

Falĉita kiel fojno (krimromano, 1997)

Trans maro kaj morto (krimromano, 1999)

Neĝo kaŝas nur... (krimromano, 2001)

La krimo de Katrina (facila rakonto, 2001)

Dis! (romano, 2001)

Kion ajn (facila rakonto, 2002)

Vojaĝo kun Katrina (facila rakonto, 2002)

Memor' mortiga (krimromano, 2003)

Katrina malfruas (facila rakonto, 2004)

Pasteĉo (25 beletraĵ stilpasticĉoj, 2005)

Amaro (novelaro, 2005)

Kroze – proze (literatura esearo 2013)

Marina (romano 2013)

Skabio (romano 2015)

Kiam la vento turniĝos (bit-libra novelaro 2015)

El ombro de l' tempo (romano 2017)

Marina ĉe la limo (romano 2018)

Ne eblas aplaŭdi unumane (romano 2019)

Sesdek ok (romano 2020)

Secesio (romano 2021)

Falaflo en maco (romano 2023)

La nepo de Marina (romano 2023)

Tradukitaj:

Hjalmar Söderberg: La kiso (novelaro, 1995)

Pär Lagerkvist, Eyvind Johnson, Harry Martinson: Nobela novelaro (1995)

Torgny Lindgren: La beleco de Merab (novelaro, 1995)

En la realo troviĝas truo (nuntempa sveda novelarto, 1996) Torgny

Lindgren: La vojo de serpento sur roko (romano, 1997) Benjamin

Jacobsen: Inter tero kaj ĉielo (facil-legaj noveloj, 1997) Carl Jonas

Love Almqvist: Tio konvenas! (romaneto, 1998) Hjalmar

Söderberg: Doktoro Glas (romano, 1998)

Hjalmar Söderberg: La pelto (novelaro, 1999) August

Strindberg: Songodramo (dramo 1999)

Selma Lagerlöf: La mirinda vojaĝo de Nils Holgersson (2002) August

Strindberg: Insulanoj de Hemsö (romano, 2005)

Hjalmar Söderberg: La serioza ludo (romano 2016)

Frans G. Bengtsson: Orm la ruĝa, volumo 2. Hejme kaj en Oriento
(romano 2019)

Tove Jansson: Kometo en Muminvalo (infanlibro 2022)

Tove Jansson: Ĉapelo de sorĉisto (infanlibro 2023)

Tove Jansson: Memoroj de Muminpatro (infanlibro 2023)

Vojaĝo kun Katrina

2023. 11. 1 발행

저자 : Sten Johanssen

발행자 : 이중기

발행처 : 서울 에스페란토 문화원

서울특별시 중구 삼일대로 305,

명동 데스빌딩 601 호

(우) 04537

문화원 : www.esperanto.kr

문화원 서점 : www.esperanto.name

메일 : leejungkee@khu.ac.kr

정가 : 5000 원

Rakontoj pri Katrina

Katrina estas juna instruistino en Svedio, kaj tri rakontoj pri ŝi en facila Esperanto konvenas por tiu, kiu scias la plej bazan vortaron kaj gramatikon. La tuta rakonto estas verkita en facila lingvaĵo, sed plej facila ĝi estas en la komencaj ĉapitroj. Post ĉiu ĉapitro sekvas klarigoj de malpli facilaj vortoj.

La libreto ne estas lernolibro, sed prezentas facilan legaĵon por ĉiu, kiu volas uzi siajn akiritajn sciojn de Esperanto por legi distran rakonton.

La krimo de Katrina - unua rakonto -

temas pri vojaĝo de Katrina al Berlino por serĉi sian amon de la antaŭa jaro, sed ne facilas retrovi ĝin sen fari krimon!

Vojaĝo kun Katrina - dua rakonto -

temas pri Katrina kaj ŝiaj lernantoj, pri vojaĝo de Gotenburgo al Bjalistoko, pri serĉado kaj sopiroj. Sed unue kaj laste ĝi temas pri *amikeco* inter junaj homoj.

Katrina malfruas - tria rakonto -

temas pri la klopodoj de Katrina formi sian vivon kun amo, laboro kaj familiaj rilatoj. Kial ŝi ĉiam ripetas la eraron de sia patrino? Kaj kial la patroj emas malaperi?